BELinformas BRAZILA ESPERANTO-LIGO WWW.esperanto.com.br/bel

n-ro 5/2013

la 27an de februaro 2013

27 de fevereiro de 2013

- La Fina Venk'
- <u>Trejnado por kursgvidantoj en Rio-de-Ĵanejro</u>
- <u>1ª Esperanta Foiro de Libroj de Niterojo</u>
- Esperanto en la Nacia Tago de la Nigrula Konscieco
- Akiru ILEI-diplomon pri E-instruado!
- <u>Omaĝo al Dario Grattapaglia Esperantisto kaj</u> sciencisto
- Lumo de la vero
- Kalendaro
- Novaĵoj de libroservo

- A vitória final
- <u>Treinamento para instrutores de Esperanto no Rio de</u> <u>Janeiro</u>
- -<u>1ª Feira do livro esperantista de Niterói</u>
- Esperanto no Dia Nacional da Consciência Negra
- Adquira um diploma ILEI sobre ensino de Esperanto!
- <u>Homenagem a Dario Grattapaglia Esperantista e cientista</u>
- Lumo de la vero
- Calendário
- Novidades na livraria

La Fina Venk'

La fina venk' estas la 7a kanzono el la nova albumo de i.d.c., signoj de viv'.

spektu la filmeton:

A vitória final

La fina venk' (A vitória final) é a 7a canção do novo álbum de i.d.c., signoj de viv' (sinais de vida).

veja o vídeo:



La filmeto estis filmita en Varsovio de Éric, kun Pieczarka, Gonja, kaj Melono.

La tuta albumo estas aŭskultebla kaj aĉetebla ĉe <u>nia paĝo</u>

O vídeo foi filmado em Varsóvia por Éric, com Pieczarka, Gonja, e Melono.

O álbum inteiro pode ser ouvido e comprado em <u>nossa página</u>

Trejnado por kursgvidantoj en Rio-de-

Treinamento para instrutores de esperanto



AERĴ (Asocio Esperantista de Rio-de-Ĵanejro) okazigos la 15an Trejnadon por kursgvidantoj de Esperanto. "Kiel organizi kurso de Esperanto?" estas la temo de la renkonto.

A AERJ (Associação Esperantista do Rio de Janeiro) promoverá o 15º Treinamento para instrutores de Esperanto, cujo tema é "Como organizar um curso de Esperanto?"



Dum la renkonto okazos 4 metiejoj: 1. instruado de Esperanto per la reto; 2. kiel organizi konversacian kurson; 3. metiejo pri uzado de lernolibrojn ekspoziciitajn; 4. instruado de Esperanto por infanoj.

Durante o evento ocorrem 4 oficinas: 1. ensino do Esperanto pela internet; 2. como organizar um curso de conversação; 3. oficina de utilização dos livros didáticos em exposição; 4. ensino do Esperanto para crianças.



La Trejnado okazos la 28an de Aprilo de la 9a ĝis la 17a horo en la lernejo Leopoldo, Av. Getúlio de Moura, 1074 - Nova Iguaçu – RJ.

Pli da detaloj per la retejo www.aerj.org.br.

Márcio Santos

O Treinamento acontecerá no dia 28 de abril de 2013 das 9h às 17h no Colégio Leopoldo, Av. Getúlio de Moura, 1074, Nova Iguaçu - RJ

Confira detalhes na página

www.aerj.org.br.

Márcio Santos

1a Esperanta Librofoiro de Niterojo

La 20an, 21an, 22an, kaj 23an de Aprilo okazos en placo Arariboia (Centro), la 1^a Esperanta Librofoiro de Niterojo.

1ª Feira do Livro Esperantista de Niterói

Nos dias 20, 21, 22 e 23 de abril acontecerá, na praça Arariboia (Centro), a 1ª Feira do Livro Esperantista de Niterói.



En budoj por pli ol mil libroj, kunlaboros la institucioj – IEBM, NITEK (Niteroja Esperanto Klubo - fondita en 1906), LORENZ, KKE kaj AERĴ.

Ni kalkulas je la partopreno kaj apogo de la esperantistaro.

Walter Fontes

Nas barracas para mais de mil livros, participarão IEBM, NITEK (Clube de Esperanto de Niterói - fundado em 1906) , LORENZ, KKE e AERJ.

Contamos com a participação e o apoio dos esperantistas.

Walter Fontes

Esperanto en la Nacia Tago de la Nigrula Konscieco

Ago okazita je la 20a de Novembro 2011 en la kvartalo Padre Miguel-RJ. Tiam dekoj da flugfolioj disdoniĝis, eĉ al la teamanoj de la sambolernejo Mocidade Independente de Padre Miguel.

Esperanto no Dia Nacional da Consciência Negra

Ação realizada em 20 de novembro de 2011 em Padre Miguel-RJ. Foram distribuídos dezenas de panfletos, inclusive aos componentes da Escola de Samba Mocidade Independente de Padre Miguel.



Kurioza detalo: la simbolo kaj la uniformo de la menciita sambo-lernejo estas verdablanka.

Evandro Caboclo

Detalhe curioso: o símbolo e o uniforme da citada escola de samba é verde e branco.

Evandro Caboclo

Akiru ILEI-diplomon pri E-instruado!

Adquira o diploma ILEI de ensino de

Temas pri unujara kurso malfermita al ĉiuj kaj organizita de ILEI kaj Universitato Adam Mickievicz. Partoprenantoj ne bezonas havi antaŭan universitatan diplomon. Tiu kurso ne okazas ĉiun jaron, do uzu la eblon aliĝi nun!

Esperanto!

O curso de um ano é aberto a todos e organizado pela ILEI e a Universidade Adam Mickievicz . Futuros participantes não precisam ter diploma de curso superior. O curso não acontece todo ano, portanto inscreva-se agora!





Dum unu semajno en Septembro 2013 kaj unu semajno en Februaro 2014 la kandidatoj devas ĉeesti kursojn kaj prelegojn en Poznano. La studado okazas ĉefe per la Reto, parte kunlabore kun edukado.net.

Fine de Septembro en Poznano okazos ARKONES, tre interesa kaj varia kultura evento. Informiĝu pri tiu kurso per mesaĝo

Luís Guilherme Jardim

al Ilona Koutny. ikoutny@amu.edu.pl

Durante uma semana em setembro 2013 e uma em fevereiro 2014 os alunos devem assistir palestras e lições em Poznan. O estudo acontece principalmente pela Internet contando com o apoio de <u>edukado.net</u>.

No fim de setembro acontece em Poznan ARKONES, interessante evento cultural. Para mais informações escreva a Ilona Koutny. ikoutny@amu.edu.pl

Luís Guilherme Jardim

Omaĝo al Dario Grattapaglia

Esperantisto kaj sciencisto

La revuo Brasília Encontro (januaro 2013) omaĝis 14 homojn loĝantajn en Brasília, kiuj elstariĝis dum la jaro 2012, interalie Dario Grattapaglia, filo de Ursula kaj Giuseppe, la nuntempaj respondeculoj de la Bieno-Lernejo Bona Espero.

Homenagem a Dario Grattapaglia

Esperantista e cientista

A revista Brasília Encontro (janeiro de 2013) homenageou 14 moradores de Brasília que se destacaram em 2012. Um dos homenageados é o cientista Dario Grattapaglia, filho de Ursula e Giuseppe, os atuais responsáveis pela fazenda-escola Bona Espero.



Dario estas denaska esperantisto, bone parolas nian lingvon, partoprenis multajn kongresojn kaj konas profunde la filozofion de Esperanto. Dario é esperantista de berço, fala bem nossa língua, participou de muitos congressos e conhece a fundo a filosofia do Esperanto.



Li estas membro de Brazila Akademio de Sciencoj kaj vere kaj entuziasme sindediĉas al la esplorado de genetikaj sciencoj.

Eurípedes Barbosa

Membro da Academia Brasileira de Ciências, ele se dedica com entusiasmo às pesquisas no campo das ciências genéticas.

Eurípedes Barbosa

Lumo de la vero



En iu bela kaj suna tago, kiam miaj du filoj estis infanoj, ili ludis sur la <u>planko</u> de granda <u>preĝejo</u>. Dum longa tempo, ili atente rigardis formikojn, kiuj rapide iris kaj revenis de unu <u>flanko</u> al la alia de malgranda loko, sed ili neniam trapasis nigran linion.



"Vidu, Ŝande! La formikoj de la flava triangulo ne trapasas la nigran linion. Ili ne iras al la ruĝa triangulo. Ili ne iras al la verda triangulo. Ili ne iras al la blua rektangulo. Ili restas en la

flava triangulo dum la tuta tempo."

"Estas vere, Ĥafa! La formikoj de la ruĝa triangulo ankaŭ ne trapasas la nigran linion. Ili ne iras al la blua rektangulo. Ili restas en la ruĝa triangulo dum la tuta tempo. Kial tio okazas?"

Venis aliaj demandoj. Kial ili restas en sia propra loko? Kial ili ne iras al la loko de aliaj formikoj? Tio estas mistero!

Ŝande diris: "Ho, certe flavaj formikoj timas la aliajn."



Formikoj kompreneble estas flavaj! Tiel opiniis la flavaj formikoj. Tiuj malsamaj formikoj estas strangaj. Formikoj ruĝaj, verdaj aŭ bluaj estas vere strangaj.

Ĥafa respondis: "Jes! Kaj la ruĝaj opinias, ke formikoj estas ruĝaj. Kompreneble bluaj, verdaj kaj flavaj formikoj estas tute strangaj."

Sed sur la mistero venis lumo. Blanka lumo venis sur la mistero. Subite Ŝande komprenis la misteron. Finfine li vere komprenis tiun misteron.

"Rigardu supren, Ĥafa! Rigardu al la multe kolora vitralo. La vero estas simpla. Kiam la blanka lumo de la suno pasas tra la diversaj koloroj de la vitralo, la formikoj aspektas flave, ruĝe, verde kaj blue!"

"Do la formikoj vere ne estas malsamaj, ĉu?",Ĥafa demandis.

"Tute ne", respondis la frato. "Ili nur ŝajnas esti malsamaj. Ili ŝajnas esti el diversaj koloroj, sed vere tiuj formikoj vivas en fantazio. Ili aspektas flave, ruĝe, verde kaj blue!", ĉar la blanka lumo pasas tra la diversaj malsamaj pecoj de koloraj vitroj de la vitralo, kaj..."

La fino de tiu parolado estis vera surprizo por mi. Mia plej juna filo venis al interesa punkto ne pri formikoj, sed pri homoj. Kun inteligenta rideto, li demandis:

"Ŝande, la formikoj vivas en fantazio! Ĉu homoj ankaŭ ne vivas en fantazio? Multaj homoj pensas, ke ili estas malsamaj. Malsamaj koloroj, malsamaj religioj, malsamaj lingvoj, sed la vero estas nur unu: la blanka lumo de la suno estas sur ĉiuj. Vere ni ĉiuj estas homoj, simplaj homoj, ĉu ne?

Paulo Nascentes

Eta vortaro:

preĝejo: preĝi: paroli al dio; preĝejo: domo por Dio-servoj.planko: malsupra ebeno de ĉambro; tio, sur kio oni iras en domo.flanko: dekstra aŭ maldekstra, antaŭa aŭ malantaŭa parto.





FEBRUARO

28-Peticio por Esperanto en Avaaz: subskribu!

28-Petição pró-Esperanto na Avaaz: assine!

2- Ago-tago 2013

- 5- <u>USP plu gastigas Esperanto-kurson</u>
- 10- Renkontiĝo de esperantistoj en la Paraiba Valo
- 13- Kuba Esperanto-renkontiĝo
- 8-Esperanto en UnB Idiomas
- 20- 1ª Esperanta Foiro de Libroj de Niterojo
- 28- <u>Trejnado por kursgvidantoj en Rio-de-Ĵanejro</u>

MARTO

- 2- Ago-tago 2013
- 5- <u>USP oferece outro curso de Esperanto</u>
- 10- Encontro de esperantistas no Vale do Paraíba
- 13- Encontro de Esperanto de Cuba

APRILO

- 8-Esperanto no UnB Idiomas
- 20-1ª Feira do livro esperantista de Niterói
- 28-<u>Treinamento para instrutores de Esperanto no Rio de</u>
 <u>Janeiro</u>



INFORMILO DE KULTURA KOOPERATIVO DE ESPERANTISTOJ

N-ro 60 Rio-de-Janejro Jan-Feb/2013

Aliĝu al niaj komunumoj en Facebook kaj Google Plus



Conecte-se a nossas comunidades no Facebook e Google Plus



Ĉu vi jam realiĝis al BEL ? Você já se refiliou à BEL ?



Jen novaj titoloj sur la bretaro de via BEL@Butiko:

Disponibilizados novos títulos na sua BEL@Butiko:

"La kapitalo" kompakte - Invado: Tero - Esperanto: komenco, aktualo kaj estonteco - Manlibro pri olimpikaj vortoj - Kajto











kaj ankoraŭ la jenajn:

e ainda os seguintes:

Besto-farmo - De animo al animo - Instrua amuzo - Interreto... inter kio? - Ora libreto - Sonorilo de Bled, La - Sur misiista barko - Kio estas SAT? - Ha! se mi scius... - Vojoj kaj formoj de penetrado de la franca leksiko en la rumanan lingvon.

Kara leganto.

Caro Leitor(a).

Vi estas la motoro de la esperanta eldonmaŝino. Ĉu vi jam montris vian forton ĉi-monate? Ankoraŭ estas tempo akiri libron ĝis la fino de februaro.

Você é o motor da máquina editorial esperantista. Você já mostrou sua força nesse mês? Ainda é tempo para adquirir um livro até o final de fevereiro.

Vizitu vian virtualan libroservon, kie vi trovos kelkcentojn da titoloj.

Visite nossa livraria virtual, onde você encontrará centenas de títulos.

www.belabutiko.esperanto.org.br

Ni volas ĝui la plezuron plenumi vian honorigan mendon.

Nós queremo ter o prazer de atender sua honrosa encomenda.

Bonan legadon!

Boa leitura!

Ni laboru kune!

Boletim bilíngue da Liga Brasileira de Esperanto Dulingva bulteno de Brazila Esperanto-Ligo SDS Ed. Venâncio III Sala 303, Brasília - DF, CEP 70.393-902 Telefones: (61) 3226-1298 Fax: (61) 3226-4446

Kunlaborantoj: Diego Ribeiro, Emilio Cid, Eurípedes Barbosa, Evandro Avellar, Evandro Caboclo, Fabiano Henrique, Fernando Maia, Luís Guilherme Jardim, Márcio Santos, Paulo Nascentes, Paulo Sérgio Viana, Rafael Zerbetto, Walter Fontes.

Sendu kontribuojn al <u>bel.informas@gmail.com</u>



Ricevu BEL Informas en via retadreso Receba BEL Informas em seu email



<u>Presu kaj kopiu por viaj kolegoj</u> <u>Imprima e copie para seus colegas</u>

www.esperanto.com.br/bel